


# Programo de KKPS

<b>Vendredo</b>	<b>Granda salono</b>	<b>Dua salono</b>	<b>Ludoangulo</b>	<b>Ekstere</b>
Ĝis 17:00	Akceptejo			
17:00-18:00	Akceptejo			
18:00-19:30	Vespermanĝo			
20:00-21:00	Bonvenigo + kvizo		Tabloludoj	
21:00-22:00	Koncerteto de Alina			
22:00-iam	Trinkejo	Gufujo		
<b>Sabato</b>	<b>Granda salono</b>	<b>Dua salono</b>	<b>Ludo-angulo</b>	<b>Ekstere</b>
8:30-9:30	Matenmanĝo			
9:30-10:30	Aventuroj de Verdaj Skoltoj	TEJO-prepar-kunsido	<b>NEJ-sembleo</b>	
10:30-11:30	Manlaboro: spagetaj pontoj		Tabloludoj	
11:30-12:30				
12:30-14:00	Tagmanĝo			
14:00-17:00		TEJO-kunsido	Tabloludoj	Bicikla ekskurso
17:00-18:00	Halovenaj ornamaĵoj			
18:00-19:30	Vespermanĝo			
20:00-21:00	Koncerto de Ĵenja		Tabloludoj	
21:00-22:00				Kuiri bananojn
22:00-iam	Trinkejo	Gufujo		
<b>Dimanĉo</b>	<b>Granda salono</b>	<b>Dua salono</b>	<b>Ludo-angulo</b>	<b>Ekstere</b>
8:30-9:30	Matenmanĝo			
9:30-10:30	Prelego pri Pasporta Servo	TEJO-prepar-kunsido	NEJ-estrarkuns.	
10:30-11:30			Tabloludoj	Ĵonglado
11:30-12:30	Kurso de elfa skribsistemo			
12:30-14:00	Tagmanĝo			
14:00-16:00	Purigado			



# Pos-Amiko

**Aŭtuno 2016, Numero 18**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## **INDEKSO:**

1. Franca polico forsendas JEB-aliĝintojn
2. Nobelpremio pri ĵurnalismo
2. Verdaj skoltoj volas imiti sukceson de TEJO
2. Sukceso ripetiĝu!
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

## **KOLOFONO**

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.  
Redaktoro: Koko Poso  
kkps.klackunveno@gmail.com  
<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

## **Franca polico forsendas JEB-aliĝintojn**

En Calais dum la pasinta semajno estis malplenigita kaj malkonstruita grandega tendaro de homoj, kiuj volis pluvojaĝi per la Manika Tunelo al Britujo. Laŭ demandado de nia ĵurnalisto surloke, A. Tendo, plejparto el ili havas invitleterojn por la JEB-renkontiĝo en Bath, kiu okazos post du semajnoj. Kiel kutime la Brita registaro decidis ne doni ajnajn vizojn, sed la ĉi-jara grupo estis tre persista kaj ek-tendumis antaŭ la tuneleniro.



*La aliĝintoj bedaŭre ne iros al Bath*

Organizanto de JEB reagis: “Ho ve. Tio fakte tute surprizas min. Mi aŭtomatigis la verkadon de invitleteroj per la sama softvaro, kiun mi uzis por mia peproboto. Mi do tute ne sciis, ke estas tiom feke multaj invititoj!”

Ŝajnas tamen, ke la franca polico malĝentile forprenis la bezonon mendi aldonajn litojn por la renkontiĝo.

## Pos-Amiko kreas Nobelpremion pri ĵurnalismo

Simile al la famaj nobelaj premioj de Svedujo (kaj Norvegujo), la vaste fama kaj respektata Pos-Amiko decidis starigi ĉiujaran premion por tiu, kiu plej kontribuis al la fako de ĵurnalismo en tiu jaro. La trikapa ĵurio (Foko Poso, Fabricio Valle kaj prezidanto Koko Poso) decidis doni la unuan premion al Paweł Fischer-Kotowski, pro lia senĉesa strebado al vero ĝis en la lasta komo.

## Verdaj skoltoj volas imiti sukceson de TEJO

La plej nova kaj plej juna movado en la movado, la verdaj skoltoj, jam dum kelkaj jaroj estas ekzemplo por aliaj Esperantistoj. Ili estas kreskanta, aktiva junulara asocio, kiu faras aliajn aferojn dum siaj kunvenoj ol prelegoj. Sed nun kiam multaj membroj preskaŭ atingas la plenan aĝon kaj pro tio eksmembriĝus, la skoltoj rigardas al sia granda frato TEJO por inspiro.

TEJO ĉi-somere altigis sian aĝlimon de 30 al 35 jaroj (la estraro de TEJO ne respondis al niaj demandoj, ĉu la celo estis remembrigi Veronika Poór). Tiu ŝanĝo kaŭzis fortajn diskutojn en la retlisto kaj eĉ unu repon dum komitatkunsido, sed finfine la komitato akceptis la ŝanĝon.

Nun la Verdaj Skoltoj ankaŭ volas altigi sian aĝlimon por havi pli grandan membraron. NEJ dum KKPS pridiskutos la temon, kaj aliaj landaj sekcioj de TEJO ankaŭ konsideras ĉu sekvi la decidon. Estas eĉ indikoj, ke UEA pripensas aldoni kelkajn jarojn al la membreco. Tiam tamen la asocio bezonos ankaŭ enkonduki sistemon por voĉdonigi la postvivajn membrojn.



*Denove membro de TEJO*

## Sukceso ripetiĝu!

Pro la granda sukceso de KKPS en la pasinta jaro, la organizo decidis aldoni unu horon al la renkontiĝo ĉi-jare. Ĉar pasintjare kelkaj plendis, ke la trinkejo tro frue fermiĝas, en la nokto post sabato la trinkejo ripetos la horon de la 2-a ĝis la 3-a. Muziko kaj trinkaĵoj ripetiĝos, ĉeestantoj tamen ne bezonos en tiu horo ripeti ĉiujn konversaciojn.

# NEJ-Novaĵoj!

## NEJ vizitis la Efteling!

Kiu diras ke NEJ-tago nepre signifas ludotagon? Ĉi-foje 14 NEJ-anoj decidis kune eltrovi, kiom da fabeloj ni memoras el infaneco kaj esplori, kiom da kuraĝo ni havas, kiam ni staras antaŭ unu el plej grandaj ondaj fervojoj de Nederlando. Kelkaj pli, aliaj malpli. Sed ni ĉiuj kune bone amuziĝis kaj konstatis, ke Efteling tro grandas por unufoja vizito. Ĉu do ideo por unu el la venontaj NEJ-tagoj? Fine de la tago ne mankis komuna manĝo, ĉi-foje ni ĝuis picojn sur stacidoma placo en Den Bosch.

## LA HOROSKOPO

**Ŝaf:** Rigardu malantaŭ vi!

**Taŭro:** Vi malkovros, ke pli bonas boato ol tomato.

**Ĝemeloj:** Eksidu apud fremdulo dum la vespermanĝo.

**Kankro:** Vi malsatos, ĉar vi eluzis viajn spagetojn por pontokonstruado.

**Leono:** Atentu pri fortaj brakumoj!

**Virgulino:** Post bananrostado vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi ne plu fidas horoskopojn kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Sen vifio vi havos tempon por malkovri kuracon de kancero.

**Kévin M.:** Vi maltrafas la plej bonan KKPS-on en historio.

**Sagitario:** Ne konfuzu mardon kaj marton.

**Kaprikorno:** Via elpensita klaĉo evidentiĝas esti vera.

**Akvisto:** Vi vojaĝos sole per grupbileto.

**Fiŝoj:** Novembro estas vere malbona monato por naĝi ekstere.

## Esperanto inter aliaj lingvoj de la mondo

NEJ-anoj ne estas nur ludemaj, sed ankaŭ studemaj kaj scivolemaj. Pro tio ni decidis partopreni lingvofestivalon Drongo en Utrechto, kiu okazis la 1-an de oktobro. Sian budon havis ankaŭ Esperanto, kie la anoj de Esperanto Nederland reklamis nian lingvon. Ankaŭ ni fiere babilis en esperanto antaŭ la budo kaj kaŝe rigardis ĉu iu el aliaj partoprenantoj aŭskultas nin. Krome ni elprovis nin kiel interpretistoj, lernis skribi la araban kaj multe eksciis pri diversaj nederlandaj lingvaj projektoj. Fine de la tago niaj vizaĝesprimoj estis kontentaj kaj niaj dorsosakoj plenaj je diversaj broŝuroj. Ankaŭ la stomakoj ne restis malplenaj, ni plenigis ilin en proksima turka rapidmanĝejo.